


DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

⊛ dumonata kristana revuo en esperanto ⊛ N-ro 6 (843) 2003 ⊛

KRISTMASKO



BIBLIO • MOVADO

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta kun UEA
Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la
Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Jacques TUINDER
✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heem-
skeerk ☎+31 251 231941;
✉ d.tuinder-dekker@wolmail.nl

Sekretario: Els van DIJK-KUPERUS
✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen
a/d Rijn, Nederlando; ☎+31 1724 20222;
✉ j.a.van.dijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER
✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn,
Germanio; ☎+49 7131 162688;
✉ SLKrueger@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€ 20,- ☉ Membro-subtenanto € 30,- ☉
Nura abono: pagante rekte al KELI € 16,- ☉
pagante al Libroservo € 18,- Sendoj de
okcidentaj monbiletoj per registrita letero
al la kasisto de KELI ☉ Se estas en via lando
UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA)
bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelk-p**
de KELI ☉ Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI:
5506132.

<http://www.chez.com/keli/>

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenot, FR 86340
Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎+33 (0)5 49 46 80 21; ✉ diaregno@alter.com.

Abonprezo sen membreco en KELI: € 16,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al
la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur
la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj,
kondiĉe, ke oni citas la fonton. Specimenon kun
reproso aŭ traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo HEJME Kazimierz Leja
✉ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
☎+4832 2650038; ✉ esperanto@hejme.e tools.pl

ENHAVTABELO

- 123 Fervoro sen scio
EI EZRA I
124 EZRA I
131 Meditigaj pensoj kaj diverstradiciaj preĝoj
por la dimanĉmatena kunveno
135 Ha! Kia potenca vorto!
Al kiu vi fidas?
136 La nescia filo
La vojo de la agla kristano
137 Ĉu Dio forgesas min?
138 La kapitalo de diablo
35a Internacia Infana Kongreseto
139 Indekso de la jaro 2003
142 Kotizoj de KELI '2004
144 Kontenteco: granda gajnilo.

Redaktoraĵo vorto

Karaj belegantoj,

Ni alvenas en kelkaj landoj de Eŭropo je la
fino de la Jaro de la Biblio. Vi povas konstati,
ke nia ĉijara kolekto enhavas sufiĉe varian
enhavon kiu rilatas al la Biblio, ĉu meditoj,
ĉu komentoj, ĉu tradukoj. Mi esperas, ke vi
ankaŭ aprezis la variecon de la aŭtoroj (el kiuj
mi aŭ ricevis, aŭ trovis la tekstojn).

Tiu varieco restas en viaj manoj, per sendado
de tekstoj. Mi rediras, ke mi preferas unuamanajn
tekstojn ol tradukoj, eĉ el plej „bonaj” aŭtoroj.
Se vi nepre volas, ke aperu la teksto de tiu „bona”
aŭtoro, intervjuu lin (ŝin) por *Dia Regno*.

Post la itala ekumena kongreso, kie la KELI-anoj
pleje forestis, ni havos en 2004 nian KELI-kongreson
en Ĉeĥio. Mi esperas, ke ni ĉeestos multe pli nombraj.

Mi deziras al vi ĉiuj plej bonajn Kristnaskajn
festotagojn.

Philippe COUSSON

FERVORO SEN SCIO

„Vivo sen prudento ne estas bona; kaj kiu tro rapidas, tiu maltrafas la vojon”.

Dum mia persona diservo ĉi-matene, mi estis kondukita verki ĉi tiun admonon. Fervoron mi havas fari la laboron de Dio. Ĉi tio estas evidenta ekde mia infaneco. Mi jam faris la laboron eĉ antaŭ ol mi havis mian edukon teologian. Mi ankoraŭ laboras nuntempe, kun fervoro! Efektive, ĝi kondukis min komenci ĉi tiun retan servon en februaro. Dum mia renkontiĝo kun la supra biblia verso, mi demandis min: Ĉu mi havas sufiĉan scion fari ĉi-servon precipe rete? Konsentite, ne.

Mi konstatas ke multe da homoj havas fervoron, sed ili ne havas la sufiĉan scion kaj prudenton superi. Izraelidoj ankaŭ estis fervoraj por Dio, sed sen scio (Rom. 10:2). Ĉu ili forlasos tian fervoron pro senprudento? Nepre ne! Kion ili faru? Ili strebu por scio. Se ili devas studi, ili faru.

Kio estas via propra fervoro por Dio? Kio estas via fervoro por aliaj aferoj? Ĉu vi havas la demanditajn sciojn por la fervoro? Aŭ, ĉu vi ĵus faras ĝin iel ajn?

Lasu min aliĝi al Paŭlo preĝante por vi: „...via amo abundu ankoraŭ plie kaj plie, en scio kaj ĉia saĝo, por ke vi aprobu la plej bonajn aferojn kaj estu sincere kaj senofendaj ĝis la tago de Kristo” (Filipianoj 1:9-10).

Je la servo de Kristo,

pastoro Bayo AFOLARANMI

EL I EZRA...

Kiel sciante, jam de jaroj mi okupiĝas pri kelkaj ampleksaj tradukprojektoj, ĉe kiuj min grave subtenas la eldonejo FONTO en Brazilo. Espereble vi — publiko — subtenos *Fonton* per via aĉetado. Tiam des pli rapide povos sekvi novaj volumoj...

Unuflanke mi tradukas el la latina: *Antologio Latina* por prezenti fakule la latinan literaturon de la komenco. Espereble ankoraŭ ĉi-jare aperos la 3a volumo. Aliflanke, el la greka mi ĉefe tradukas Bibliajn tekstojn: koncerne la Novan Testamenton mi povas malkaŝi, ke mi estas nun atendanta la (espereble lastajn) presprovaĵojn de mia Paŭlo-traduko: *Leteroj de Paŭlo kaj lia Skolo* estas la titolo de la volumo, kiu ampleksos — en la supozata verkiĝo-sinsekvo — la NT-ajn leterojn de *Al la Romanoj* ĝis *Al Filemon*.

Koncerne la Oldan Testamenton, aperis el la hebrea mia traduko de *Nombroj*, kaj el la greka *La Duakanonaj Libroj*, vol. 1 + 2, t.e. tiuj libroj, kiujn oficiale rekonas la Romkatolika Eklezio. Sed la Grek-Ortodoksia kaj la Rus-Ortodoksia Eklezioj krom tio ankoraŭ havas kelkajn pliajn librojn. Ankaŭ tiujn mi volas aperigi en Esperanto, nome sub la titolo *La Duakanonaj Libroj*, vol. 3.

El tiu ĉi lasta „projekto” mi volas montri al vi provizore jam fragmenton. Temas pri la libro *I Ezra*. En la komenco oni havas la impreson legi nur konatajn erojn el la kutima hebrea O.T., sed subite jen aperas nekonata ĉarma rakonto pri tri junuloj...

Gerrit BERVELING

1:1 Joŝija faris en Jerusalem la Paskon por sia Sinjoro, kaj li oferis la Paskon en la dekvara tago de la unua monato. 2 Li starigis la pastrojn, en ties belaj roboj, en la sanktejo de la Sinjoro, laŭ iliaj subdividoj por la taga servado. 3 Kaj li diris al la Levidoj, la templo-servantoj de Izrael, ke ili sin purigu antaŭ la Sinjoro, por meti la sanktan keston de la Sinjoro en la domon, kiun konstruis Salomono, filo de David, reĝo de Izrael. <Li diris:> Vi ne bezonas porti ĝin sur la ŝultroj. 4 Adoru nun la Sinjoron, vian Dion, kaj servu al Lia popolo Izrael. Kaj aranĝu vin laŭ viaj patrodomoj, laŭ viaj grupoj, laŭ la preskribo de David, reĝo de Izrael, kaj laŭ la grandeco de lia filo Salomono. 5 Kaj prenu viajn lokojn en la sanktejo laŭ la ordoj de la prapatraj domoj de viaj Levidoj, kiuj servas antaŭ viaj fratoj, la Izraelidoj. 6 Kaj oferu la Paskon, kaj preparu la oferojn por viaj fratoj, kaj faru la Paskon laŭ la ordonoj de la Sinjoro, kiujn Li donis per Moseo.

7 Kaj al la ĉeestanta popolo Joŝija donis donece tridek mil ŝafojn kaj ŝafidojn, kaj tri mil bovidojn; ĉion tion li donis el la havaĵo de la

reĝo, kiel li promesis al la popolo kaj al la pastroj kaj la Levidoj. 8 Kaj Ĥilkija, Zeharja, kaj Jehiel, la estroj en la sanktejo, <donis> al la pastroj por la Pasko du mil sescent ŝafidojn kaj tricent bovidojn. 9 Kaj Konanja, Ŝemaja, kaj lia frato Netanel, kaj Ĥaŝabja, Jeiel, kaj Jozabad¹, milestroj <de la Levidoj>, donis al la Levidoj por la Pasko kvin mil ŝafidojn kaj sepcent bovidojn.

10 Tiamaniere la servado estis aranĝita: laŭorde stariĝis antaŭ la popolo la pastroj kaj la Levidoj, 11 portante la macojn, laŭ siaj grupoj 12 kaj laŭ siaj prapatraj domoj, por oferi al la Sinjoro laŭ la preskriboj en la libro de Moseo. Tio okazis matene. 13 Kaj ili rostis la Paskon super la fajro, kiel estas inde, kaj ili kuiris la oferojn en kaldronoj kaj en potoj, kaj tio bone odoris, kaj ili disportis porciojn por ĉiuj en la popolo. 14 Kaj poste ili ankaŭ pretigis por si mem kaj por siaj fratoj, la pastroj, la Aaronidoj; ĉar la pastroj plu oferadis la sebon ĝis noktiĝo, kaj la Levidoj do pretigadis por si mem kaj por siaj fratoj, la pastroj, la Aaronidoj. 15 La templo-kantistoj, la idoj de Asaf, estis sur siaj poste-

noj laŭ la preskribo de David: Asaf, Heman², kaj Jedutun de la reĝa korto; kaj la pordegi-stoj estis ĉe ĉiu pordego; ili ne bezonis forlasi sian servadon, ĉar iliaj fratoj, la Levidoj, preparis por ili.

16 Tiamaniere estis aranĝita en tiu tago la servado al la Sinjoro, per farado de la Pasko kaj alportado de oferoj sur la altaro de la Sinjoro, laŭ la ordono de reĝo Joŝija. 17 Kaj la Izraelidoj, kiuj tie troviĝis, faris la Paskon en tiu tempo kaj la feston de macoj dum sep tagoj. 18 Tia Pasko ne estis farita en Izrael de post la tempo de la profeto Samuel; 19 kaj el ĉiuj reĝoj de Izrael neniu faris tian Paskon, kian faris Joŝija, la pastroj, la Levidoj, ĉiuj Judoj kaj tuta Izraelo, kiuj tie troviĝis loĝante en Jerusalem. 20 Tiu ĉi Pasko estis farita en la dek-oka jaro de la reĝado de Joŝija.

21 Kaj Joŝija faris ĉion bone antaŭ sia Sinjoro, en plenkoraj pieco. 22 Kaj la okazaĵoj de lia reĝado estis priskribitaj en malnova tempo, <historio de> pekado kaj malpieco kontraŭ la Sinjoro, pli ol ĉe iu ajn alia popolo aŭ regno, kaj kiel ili ĉagrenis Lin, tiel ke la vortoj de la Sinjoro trafis Izraelon.

23 Post ĉio, kion Joŝija plenumis, okazis ke Faraono, reĝo de Egiptujo, eliris milite kontraŭ Karkemiŝon ĉe Eŭfrato. Kaj eliris kontraŭ lin Joŝija. 24 Kaj la reĝo de Egiptujo sendis al li senditojn, por diri: Kio estas inter mi kaj vi, ho reĝo de Judujo? 25 Ne kontraŭ vin mi nun iras, sendita de la Sinjoro Dio, ĉar militon mi havas kontraŭ Eŭfraton. Nun la Sinjoro estas kun mi, la Sinjoro ja estas kun mi, instigante min. Retiriĝu, kaj ne kontraŭstaru la Sinjoron.

26 Sed Joŝija ne reiris al sia ĉaro, sed li provis batali kontraŭ li, ne atentante la parolojn de la profeto Jeremia el la buŝo de la Sinjoro. 27 Li batalis kun li en la valo de Megido.

Kaj la komandantoj venis malsupren al reĝo Joŝija. 28 Kaj la reĝo diris al siaj servantoj: Forkonduku min el la batalo, ĉar mi estas tre malforta. Kaj tuj liaj servantoj forkondukis lin de la batakampo, 29 kaj li suriĝis sur sia dua ĉaro. Kaj reveturigite al Jerusalem, li mortis, kaj oni enterigis lin en la tombo de liaj patroj.

30 Kaj la tuta Judujo funebris pri Joŝija. Ankaŭ Jeremia plorkantis pri Joŝija; kaj la pligravuloj kun siaj edzinoj faris plorkantojn pri li ĝis la nuna tago; kaj fariĝis tradicie ke tio okazu daŭre en la tuta popolo de Izrael. 31 Tio ĉi estas priskribita en la libro de la historioj pri la reĝoj de Judujo; kaj ĉiuj unuopaj agoj de Joŝija, kaj lia gloro, kaj lia kompreno pri la leĝo de la Sinjoro, kaj kion antaŭe li faris kaj la nunaj aferoj estas rakontataj en la libro de la reĝoj de Izrael kaj Judujo.

32 La popolo de la lando prenis Jehoahaz-on, filon de Joŝija, kaj faris lin reĝo anstataŭ lia patro en Jerusalem. Li havis la aĝon de dudek tri jaroj. 33 Tri monatojn li reĝis en Judujo kaj Jerusalem. La reĝo de Egiptujo detronigis lin en Jerusalem, 34 kaj punis la landon per kontribucio de cent talantoj da arĝento kaj unu talanto da oro. 35 Kaj la reĝo de Egiptujo ekreĝigis super Judujo kaj Jerusalem lian fraton Jehojakim. 36 Kaj Jehojakim enprizonigis la nobelojn, kaptis sian fraton Zario kaj rekondukis lin el Egiptujo.

37 Jehojakim havis la aĝon de dudek kvin jaroj, kiam li ekreĝis en Judujo kaj Jerusalem. kaj li agadis malbone antaŭ la Sinjoro. 38 Kontraŭ lin iris Nebukadnecar, reĝo de Babel, kaj ligis lin per bronzaĵoj, por forkonduki lin en Babelon. 39 Kaj parton el la sanktaj vazoj de la Sinjoro, Nebukadnecar transportis en Babelon, kaj metis ilin en sian templon en Babel. 40 La cetera historio

* La nombrado de la versikloj iom varias laŭ diversaj eldonoj; ni sekvas tiun de la eldono de LXX de Alfred Rahlfs.

¹ Koncerne la sufiĉe multajn nomojn de ĉi verko, jen averto unufoja por ĉiam: La Greka teksto de LXX donas nom-formojn kiuj ne malofte ne tute kongruas kun tiuj de la kompareblaj rakontoj en la Hebre-lingvaj bibliaj libroj. Ĉi tie, en ĉi versiklo, ni renkontas ekzemple la formojn Jehonjas, Samajas, Natanael, Asabias, Ohielos kaj Joram. Ĉe pluraj el ili estas klare, ke temas pri malsama prononco de — baze — la sama nomo; alian fojon, kiel ekzemple ĉe Joram, tio ne estas tute certa. Tamen, por montri kiel eble plej klare la paralelecon kun la tekstoj, menciitaj enkonduke al Ezra 1, ni kiom eble retenis la Hebreajn nom-formojn el la t.n. *Londona Biblio*.

² La Greka teksto ĉi tie — erare — parolas pri Zaĥarja; komparu kun versiklo 8.

de Jehojakim, kaj liaj malpuraĵoj, kaj lia malpieco, estas priskribitaj en la libro de la anuloj de la reĝoj.

41 Kaj anstataŭ li ekreĝis lia filo Jehojahin. Kiam li fariĝis reĝo, li havis la aĝon de dek ok jaroj, 42 kaj tri monatojn kaj dek tagojn li reĝis en Jerusalemon. Kaj li agadis malbone antaŭ la Sinjoro.

43 Kiam la jaro finiĝis, reĝo Nebukadnecar transiris lin en Babelon, kune kun la sanktaj vazoj de la Sinjoro, 44 kaj li faris lian fratton Cidkija reĝo super Judujo kaj Jerusalemon. La aĝon de dudek unu jaroj havis Cidkija, kaj dek unu jarojn li reĝis. 45 Kaj li agadis malbone antaŭ la Sinjoro. Li ne humiliĝis antaŭ la vortoj kiujn la profeto Jeremia diris nome de la Sinjoro. 46 Kvankam reĝo Nebukadnecar igis lin ĵuri je la nomo de la Sinjoro, tamen falsjure li ribelis kontraŭ li; li malmoligis sian nukon kaj obstinigis sian koron, kaj transpaŝis la leĝojn de la Sinjoro, la Dio de Izrael. 47 Ankaŭ la estroj de la popolo kaj de la pastroj agadis malpie kaj kontraŭleĝe, pli ol la malpuraĵoj de ĉiuj nacioj, kaj ili malpurigis la domon de la Sinjoro, kiun Li sanktigis en Jerusalemon. 48 La Dio de iliaj patroj avertadis ilin per Siaj senditoj, ĉar Li domaĝis ilin kaj Sian loĝejon. 49 Sed ili mokis Liajn senditojn, kaj je la tago kiam parolis la Sinjoro, ili ridis pri Liaj profetoj, ĝis koleriĝinte kontraŭ Sia popolo pro iliaj malpiaĵoj, Li ordonis irigi kontraŭ ili la reĝojn de la Ĥaldeoj. 50 Tiuj mortigis iliajn junulojn per la glavo ĉirkaŭ ilia sanktejo, kaj indulgis nek junulon nek virgulinon, nek maljunulon nek infanon, ĉar ĉiujn Li transdonis en iliajn manojn. 51 Kaj ĉiujn sanktajn vazojn de la Sinjoro, la grandajn kaj la malgrandajn, kaj la trezorkestojn de la Sinjoro, kaj la reĝajn ŝrankojn ili transportis al Babel. 52 Kaj ili bruligis la domon

de la Sinjoro, detruis la muregojn de Jerusalemon, kaj bruligis iliajn turojn per fajro 53 kaj komplete neniigis ĉiujn ĝiajn gloraĵojn. La postvivantojn li³ kondukis per la glavo al Babel. 54 kaj ili laboris kiel liaj sklavoj, kaj ankaŭ por liaj filoj, ĝis ekreĝis la Persoj, kiel plenumo de la vorto de la Sinjoro per la buŝo de Jeremia: 55 Ĝis kiam la lando ĝojos pri siaj sabatoj, ĝi sabatos la tutan tempon de sia forlasiteco, ĝis plenumiĝos sepdek jaroj.

2:1 Dum Ĉiro la unuan jaron reĝis pri la Persoj, por ke plenumiĝu la vorto de la Sinjoro per la buŝo de Jeremia, la Sinjoro ekscitis la spiriton de Ĉiro, reĝo de la Persoj, kaj ĉi tiu proklamigis en sia tuta regno voĉe kaj skribe jenon: 2 Tiele diras Ĉiro, reĝo de la Persoj: Min indikis kiel reĝon de la loĝata tero la Sinjoro de Izrael, la Sinjoro Plejalta, kaj Li komisiis al mi konstrui al Li domon en Jerusalemon, kiu estas en Judujo. 3 Se do iu inter vi estas el Lia popolo, kun tiu estu lia Sinjoro; kaj li iru en Jerusalemon, kiu estas en Judujo, kaj konstruu la domon de la Sinjoro de Izrael. Tio estas la Sinjoro kiu ektendumis en Jerusalemon. 4 Kaj ĉiu el vi, en kiu ajn loko li loĝas, estu helpata de la loĝantoj de lia loko per oro kaj arĝento, per donacoj, ĉevaloj kaj brutoj, apud vot-oferaĵoj por la domo de la Sinjoro, kiu estas en Jerusalemon.

5 Kaj leviĝis la ĉefoj de la patrodomoj de Jehuda kaj de Benjamin, kaj la pastroj kaj la Levitoj, kaj ĉiu, en kiu la Sinjoro vekis la spiriton por iri konstrui la domon de la Sinjoro en Jerusalemon. 6 Kaj ĉiuj iliaj ĉirkaŭantoj helpis al ili en ĉio, per arĝento kaj oro, per ĉevaloj kaj brutoj, kaj per amaso da vot-oferaĵoj de ĉiuj, kies menso estis vekita. 7 Kaj reĝo Ĉiro elportigis la sanktajn vazojn de la Sinjoro, kiujn Nebukadnecar estis elportinta el Jerusalemon kaj metinta en la do-

mon de liaj idoloj. 8 Ĉiro, reĝo de la Persoj, elportigis kaj transdonigis ilin al sia trezoristo Mitredat, kaj tiu transdonis ilin al Ŝeŝbacar, princo de Judujo. 9 Kaj jen estas ilia nombro: da oraj pelvoj mil, da arĝentaj pelvoj mil, da arĝentaj incensiloj dudek naŭ, 10 da oraj kalikoj tridek, da arĝentaj duoblaj kalikoj kvarcent dek, da aliaj vazoj mil. 11 Ĉiuj ĉi tiuj vazoj estis transdonitaj, oraj kaj arĝentaj, kvin mil kvarcent sesdek naŭ. Ĉion ĉi tion kunportis Ŝeŝbacar, samtempe kun la reirado de la forkaptitoj, el Babel en Jerusalemon.

12 En la tempo de Artahŝaŝt, reĝo de la Persoj, Biŝlam, Mitredat, Tabeel, Reĥum, Beltem kaj Ŝimŝaj, la skribisto, kaj la ceteraj el iliaj kunuloj, kiuj loĝis en Samario kaj en la aliaj lokoj, skribis al li kontraŭ la loĝantoj de Judujo kaj Jerusalemon la sube kopiitan leteron:

13 Al reĝo Artahŝaŝt, la sinjoro, viaj sklavoj Reĥum la raportisto⁴, Ŝimŝaj, la skribisto, kaj la ceteraj juĝistoj de ilia konsilio en Celasirio kaj Fenicio: 14 Estu sciata al la sinjoro, la reĝo, ke la Judoj, kiuj foriris de vi kaj venis al ni en Jerusalemon, rekonstruas nun tiun ribeleman kaj malbonan urbon, riparas ĝiajn vendoplacojn kaj muregojn kaj starigas jam la fundamentojn de templo. 15 Se nun do tiu urbo estos konstruita kaj la muregoj estos finitaj, tiam ili ne nur donos tributon nek impostojn nek jarpagon, sed ankaŭ rezistos al la reĝoj. 16 Kaj ĉar nun la laboro pri la templo progresas, ni opinias bona ne neglekti ĉi tion, sed averti nian sinjoron, la reĝon, por ke, se ŝajnas bone al vi, oni rigardu en la libroj de viaj patroj, 17 kaj vi trovos en la kronikoj, kio estas skribita pri ili, kaj vi konvinkigos, ke tiu urbo estis urbo ribelma kaj ĝenoporta por la reĝoj kaj la urboj, kaj ke la Judoj estis ribelaj kaj starigis blo-

kadojn en ĝi de la plej malproksimaj tempoj, kio estas la kaŭzo, pro kiu tiu urbo estis detruita. 18 Ni do sciigas al la sinjoro reĝo, ke se tiu urbo estos rekonstruita kaj ĝiaj muregoj estos finitaj, tiam ne plu estos transiro por vi al Celasirio kaj Fenicio.

19 La reĝo responde skribis al Reĥum, kiu skribis la raporton, al Beltem, al Ŝimŝaj la skribisto, kaj al la ceteraj el iliaj kunuloj, kiuj loĝis en Samario, en Sirio kaj en Fenicio: 20 Mi legis la leteron, kiun vi sendis al mi. 21 Mi do donis ordonon, ke oni rigardu; kaj oni trovis, ke tiu urbo de malproksima tempo ribeladis kontraŭ la reĝoj, kaj ke la homoj en ĝi faradis ribelojn kaj militojn 22 kaj ke en Jerusalemon estis fortaj kaj potencaj reĝoj, kiuj regis super Celasirio kaj Fenicio kaj ricevis tributojn de tie. 23 Nun mi do ordonas malhelpi tiujn homojn en ilia konstruado pri la urbo, 24 kaj esti singardaj, ke nenio alia estu farata kaj ke tiuj fiaĵoj ne plimultiĝu je malprofito por la reĝo.

25 Post tralego de tiu letero de reĝo Artahŝaŝt, Reĥum, kaj Ŝimŝaj, la skribisto, kaj iliaj kunuloj, tuj iris en Jerusalemon kun rajdistaro kaj kun amaso da soldatoj por haltigi la konstruantojn. 26 Kaj tiam ĉesiĝis la konstrulaboro ĉe la sanktejo en Jerusalemon ĝis la dua jaro de la reĝado de Dario, reĝo de la Persoj.

3:1 Reĝo Dario organizis grandan bankedon por ĉiuj, kiuj estis sub li, por ĉiuj kiuj naskiĝis en lia domo, por ĉiuj nobeloj de Medujo kaj Persujo 2 por ĉiuj satrapoj, generaloj kaj guberniestroj, kiuj estis sub li, en la cent dudek sep satrapejoj ekde Hindujo ĝis Etio- pio. 3 Ili manĝis kaj trinkis, kaj kiam ili estis satigitaj, ili foriris, kaj reĝo Dario iris al sia dormoĉambro, enlitiĝis kaj denove vekigis.

4 La tri junuloj, kiuj kiel korpogardistoj

³ Nebudkadnecar.

⁴ Traduko ne tute certa.

prigardis la sekurecon de la reĝo, diris inter si: 5 Ĉiu el ni diru unu aferon, kiu estas la plej forta; kaj kies opinio ŝajnas la plej saĝa, al tiu reĝo Dario donu grandajn donacojn, kaj grandajn venko-premiojn. 6 Li portu purpuran vestaĵon, trinku el oraj pokaloj, dormu en ora lito, kaj li havu ĉaron kun oraj bridoj, turbanon el delikata tolo, kaj kolĉenon ĉirkaŭ la kolo. 7 Kaj pro sia saĝeco li sidu apud Dario, kaj havu la titolon parenco de Dario.

8 Kaj ĉiu skribis sian opinion, sigelis ĝin, kaj metis ĝin sub la kusenon de reĝo Dario, kaj ili diris: 9 Kiam vekigis la reĝo, oni donos la skribaĵon al li, kaj pri kiu juĝos la reĝo kaj la tri nobeloj de Persujo, ke ties vortoj estas la plej saĝaj, al tiu apartenos la venko, laŭ kio skribiĝis. 10 La unua skribis: Plej forta estas la vino. 11 La dua skribis: Plej forta estas la reĝo. 12 La tria skribis: Plej fortaj estas la virinoj, sed ĉion venkas la vero.

13 Kiam vekigis la reĝo, oni prenis la skribaĵon kaj donis al li, kaj li legis. 14 Kaj li invitis ĉiujn nobelojn de Persujo kaj de Medujo, kaj la satrapojn, la generalojn, la guberniestrojn, kaj la prefektojn, kaj li eksidis en sia konsilia salono, kaj li legis la skribaĵon antaŭ ili. 15 Li diris: Alvoku la junulojn, kaj ili klarigu siajn vortojn. Ili estis alvokitaj, kaj envenis. 16 Li diris al ili: Klarigu al ni, kion vi skribis.

17 La unua, kiu menciis la forton de la vino, komencis kaj diris: 18 Sinjoroj, kial la plej forta estas la vino? Ĉar ĝi erarigas la menson de ĉiuj homoj, kiuj ĝin trinkis. 19 Ĝi egaligas la menson de reĝo al tiu de orfo, tiun de sklavo al tiu de liberulo, tiun de malriĉulo al tiu de riĉulo. 20 Kaj ĉiujn pensojn ĝi turnas al festado kaj gajeco, kaj forgesigas pri ĉiuj zorgoj kaj ŝuldoj. 21 Kaj ĉiujn korojn ĝi faras riĉaj, ne memoras pri reĝo aŭ satrapo, kaj igas ĉiujn paroli laŭ talantoj⁵. 22 Kiam

oni drinkas, oni forgesas amike rilati al siaj amikoj kaj fratoj, kaj baldaŭ oni elingigas la glavojn. 23 Kaj rekonsciiĝante for de la vino, oni ne plu memoras, kion oni faris. 24 Sinjoroj, ĉu ne la plej forta estas la vino, ĉar ĝi devigas la homojn agi tiel? Li eksilentis post ĉi tiuj vortoj.

4:1 Tiam ekparolis la dua, kiu menciis la forton de la reĝo: 2 Sinjoroj, ĉu ne la plej fortaj estas la homoj, kiuj regas la teron kaj la maron, kaj ĉion en ili? 3 Sed la reĝo estas pli forta kaj regas kaj mastras super ili, kaj kion ajn li ordonas al ili, pri tio ili obeas. 4 Se li ordonas al ili fari militon unu kontraŭ la alia, ili tion faras; kaj kiam li elsendas ilin kontraŭ la malamikojn, ili iras, kaj konkeras montojn, murojn kaj turojn. 5 Ili mortigas kaj mortigas, sed la vorton de la reĝo ili ne malobeas; se ili venkas, ili alportas ĉion al la reĝo — kiun ajn predon ili akiras kaj ĉion ceteran. 6 Kaj kiuj ne militservas nek batalas, sed kultivas la teron, — se ili semas kaj rikoltas, ili alportas el ĝi al la reĝo; kaj reciproke ili devigas unu la alian pagi tributojn al la reĝo. 7 Sed tamen li estas nur unusola! Se li ordonas mortigi, ili mortigas; se <li ordonas> liberigi, ili liberigas. 8 Li ordonas ataki, ili atakas; li ordonas ruinigi, ili ruinigas; li ordonas konstrui, ili konstruas; 9 li ordonas terenbati, ili terenbatas; li ordonas planti, ili plantas. 10 Tuta lia popolo kaj liaj armeoj obeas lin. 11 Krom tio, li ekripozas, li manĝas, trinkas kaj ekdormas, sed ili gardostaras ĉirkaŭ li, kaj neniu el ili povas foriri por prizorgi siajn proprajn aferojn, nek malobei al li. 12 Sinjoroj, kial ne estas la plej forta la reĝo, ĉar li estas obeenda en tiu maniero? Kaj li eksilentis.

13 La tria, kiu menciis la virinojn kaj la veron (tiu estis Zerubabel), komencis paro-

li: 14 Sinjoroj, ĉu ne granda estas la reĝo, ĉu ne multaj la viroj, ĉu la vino ne estas forta? Kaj kiu regas super ili, kiu havas estradon super ili? Ĉu ne la virinoj? 15 La virinoj naskas la reĝon kaj ĉiun popolon, kiu regas super maro kaj tero. 16 El virinoj ili naskiĝis; kaj virinoj edukis la virojn, kiuj plantas la vitejojn, el kiuj estiĝas la vino. 17 La virinoj faras la vestaĵojn de la viroj; la virinoj faras la gloron de la viroj; la viroj ne povas ekzisti sen la virinoj. 18 Se viroj kolektas oron, arĝenton aŭ iujn ajn aliajn valoraĵojn, kaj ekvidas unu virinon, mirindan laŭ aspekto kaj belo, 19 ĉion ĉi tion ili delasas, kaj nur ŝin ili alĝapas kaj buŝmalferme ili alrigardas ŝin, kaj ĉiuj preferas ŝin super oro, arĝento aŭ ĉiu alia belaĵo. 20 La viro postlasas sian propran patron, kiu edukis lin, kaj sian propran regionon, kaj aliĝas al sia edzino. 21 Kaj kun sia edzino li finas siajn tagojn, ne plu memorante la patron nek la patrinon, nek sian regionon. 22 Tial vi do konsci, ke la virinoj regas super vi.

Ĉu vi ne klopodas kaj laboras, por porti ĉion donace al la virinoj? 23 La viro prenas sian glavon, li ekiras vojaĝi, kaj rabi kaj ŝteli, kaj navigi maron kaj riverojn; 24 li alfrontas la leonon, piediras tra la mallumo, kaj kiam li ŝtelas, rabas aŭ forkaptas ion, li reportas ĝin al sia amatino. 25 La viro amas sian edzinon pli ol siajn gepatrojn. 26 Multaj viroj mensperdiĝis pro virinoj, kaj fariĝis sklavo pro ili. 27 Multaj pereis, ekstumblis aŭ pekis pro virinoj. 28 Ĉu vi ankoraŭ ne kredas min?

Ĉu la reĝo ne estas granda en sia potenco? Ĉu ne ĉiuj regionoj timas ektuŝi lin? 29 Sed mi vidis lin kun Apame, la konkubino de la reĝo, la filino de lia moŝto Bartako: ŝi sidis dekstre de la reĝo 30 kaj deprenis la diademon de la kapo de la reĝo, kaj metis ĝin al si sur la kapon, kaj ŝi frapis la reĝon per sia dekstra mano. 31 Kaj ĉe tio la reĝo nur

buŝmalferme alrigardis ŝin. Kiam ŝi alridas lin, li ridas; sed kiam ŝi ekkoleras kontraŭ li, li flatas ŝin, por ke ŝi repaciĝu kun li. 32 Sinjoroj, kial ne estas fortaj la virinoj, ĉar tiel ili agas?

33 La reĝo kaj la nobeloj rigardis unu al la aliaj.

34 Tiam li ekparolis pri la vero: Sinjoroj, ĉu ne fortaj estas la virinoj? Granda estas la tero, kaj alta la ĉielo, kaj rapide iras la suno, ĉar la cirklon de la ĉielo ĝi rondiras kaj revenas al sia deirpunkto en unu tago. 35 Ĉu ne granda estas kiu tion faras? Sed la vero estas granda, kaj pli forta ol ĉio. 36 La tuta mondo vokas pri la vero, kaj la ĉielo ĝin laŭdas. Kaj ĉiuj faroj <de Dio> skuiĝas kaj tremas, kaj ĉe ĝi estas nenio maljusta. 37 Maljusta estas la vino, maljusta la reĝo, maljustaj la virinoj, maljustaj estas ĉiuj homidoj, kaj maljustaj ĉiuj iliaj agoj, kaj ĉio simila. En ili ne estas vero, kaj en sia maljusto ili pereos. 38 Sed la vero restas firma ĝis eterneco, kaj vivas kaj fortas por eterne kaj ĉiam. 39 Ĉe ĝi ne estas partio nek preferoj, sed ĝi faras justecon anstataŭ ĉiu maljusto kaj fieco. Ĉiuj laŭdas ĝiajn farojn, kaj en ĝia juĝo estas nenio maljusta. 40 Kaj al ĝi apartenas la forto, kaj la regno, kaj la gloro, kaj la majesto de ĉiuj eternecoj. Laŭdata <estu> la Dio de la vero! 41 Li ĉesis paroli, kaj la tuta popolo ekkriis, kaj diris: Granda estas la vero, kaj la plej forta!

42 Tiam la reĝo diris al li: Petu, kion vi deziras, pli ol estis skribite, kaj ni donacos ĝin al vi, ĉar vi montriĝas la plej saĝa. Kaj vi sidas apud mi, kaj nomiĝos mia parenco. 43 Tiam li diris al la reĝo: Memoru ke en la tago, kiam vi transprenis la reĝecon, vi faris la voton konstrui Jerusalemon, 44 kaj resendi ĉiujn vazojn rabbitajn el Jerusalemo, kiujn Ciro apartigis, kiam li faris la voton, neniigi Babelon kaj resendi ilin tien returne. 45 Vi faris la voton konstrui la templon, kiun bruli-

⁵ Kvazaŭ ili posedus talantojn.

gis la Idumeanoj, kiam Judujo estis dezertigita de la Ĥaldeoj. 46 Jen do tio estas, kion mi petas de vi, sinjoro reĝo, mia deziro, konforme al via grandeco: mi petas do, ke vi plenumu vian voton, kiun per via buŝo vi faris al la Reĝo de la ĉielo.

47 Reĝo Dario ekstaris, kisis lin, kaj skribis por li leterojn al ĉiuj trezoristoj, guberniestroj, generaloj kaj satrapoj, ke ili donu sekuran vojaĝon al li kaj al ĉiuj, kiuj kun li iros por konstrui Jerusalemon. 48 Kaj al ĉiuj guberniestroj en Celesirio kaj Fenicio, kaj al tiuj en Lebanon, li skribis leterojn, ke ili venigu cedrolignon de Lebanon al Jerusalemon, kaj ke ili helpu lin konstrui la urbon. 49 Kaj li skribis profite al ĉiuj Judoj, kiuj ekiris el lia reĝlando al Judujo, pro ilia libereco, ke neniu potenculo, satrapo, guberniestro aŭ trezoristo perforte eniru en iliajn pordojn; 50 ke la tuta regiono, kiun ili okupos, estu ilia, sen tributo-pago; ke la Idumeanoj delasu de la vilaĝoj de la Judoj, kiujn ili konkeris; 51 ke por la konstruado de la templo ĉiujare dudek talantoj estu donataj, ĝis ĝi estos preta; 52 kaj aliaj dek talantoj ĉiujare por la ĉiutagaj bruloferoj sur la altaro, laŭ la ordono plenumi dek sep oferojn; 53 kaj ke ĉiuj, kiuj revenas

el Babel por konstrui la urbon, ricevu liberecon, por ili mem kaj iliaj infanoj kaj por ĉiuj pastroj, kiuj revenis. 54 Li ankaŭ skribis pri iliaj elspezoj kaj la pastraj vestaĵoj, en kiuj ili plenumu sian oficon. 55 Kaj li skribis ke al la Levidoj oni pagu la elspezojn ĝis la tago, kiam la templo estos preta kaj Jerusalemon konstruita. 56 Kaj pri ĉiuj gardistoj de la urbo li skribis, ke oni donu al ili terpecojn kaj porvivan. 57 Kaj li resendis ĉiujn vazojn el Babel, kiujn Ciro apartigis; kaj ĉion, kion Ciro ordonis fari, ankaŭ li ordonis fari kaj resendi al Jerusalemon.

58 Kiam la junulo iris eksteren, li levis sian vizaĝon al la ĉielo direkte al Jerusalemon, kaj laŭdis la Reĝon de la ĉielo, dirante: 59 De Vi <venas> la venko, de Vi la saĝo, Via estas la gloro kaj mi estas Via servanto. 60 Laŭdata estas Vi, kiu donis al mi saĝon; kaj mi dankas Vin, Sinjoro de niaj patroj.

61 Kaj li prenis la leterojn, kaj iris al Babel, kaj li rakontis ĉion al siaj fratoj. 62 Kaj ili laŭdis la Dion de siaj patroj, ĉar Li donis al ili liberigon kaj permeson 63 reiri kaj rekonstrui Jerusalemon kaj la sanktejon, super kiu alvokiĝis Lia nomo; kaj ili festadis, kun muziko kaj ĝojo, dum sep tagoj.

Nekrologo:

Hella Lanka (1925–2003)

Forlasis nin la longjara sekretariino de la Ekumena Esperanto-Ligo (germana sekcio de KELI) la 25an de junio 2003. Hella Lanka naskiĝis en Gera en Turingo. En 1946 ŝi venis al Hamburgo kaj eklaboris ĉe la polico. Jam en 1948 ŝi fariĝis membro de Hamburga Esperanto-Societo. Dum multaj jaroj ŝi estis sekretariino kaj kasistino de la klubo. En 1974 ŝi organizis loken en Hamburg-Langenhorn la ekumenan kongreson kun la temo: „Li, la Majstro — ni, la gefratoj”. Kongresanoj povis viziti la diakonian instituton „Rauhhaus”. Malgraŭ diversaj malsanoj kaj pluraj operacioj ŝi ĉiam estis preta helpi en iu ajn laboro por Esperanto. Samtempe ŝi ankaŭ en aĝo de 78 jaroj estis krom KELI en Sociala Ligo, Konsilantaro de Maljunuloj, Vivosavantoj kaj aliaj. Ŝi mortis laŭ sia vivostilo: Survoje al kunveno de la Sociala Ligo ŝia koro ĉesis batadi.

Siegfried KRÜGER

MEDITIGAJ PENSOJ KAJ DIVERSTRADICIAJ PREĜOJ POR LA DIMANĈMATENA KUNVENO

Matena preĝo

La aŭrora ruĝo vestas sin per lumkostumo, honorante la Kreinton de ĉiuj homoj. La alta ĉielo formetas sian nubkovraĵon kaj kliniĝas antaŭ la Kreinto de homoj. La suno, la reĝino inter la steloj, etendas siajn radiojn kiel orajn harojn. La vento, blovanta super la tero, survoje karesas la pintojn de la arboj. Kaj mi aŭdas ĝian parolon en la branĉoj. En la arboj pepas la birdoj; ili alportas kanton al la Sinjoro de la mondo. La floroj dismontras siajn kolorojn kaj odorojn. Estas ĝuo kaj ĝojo ilin vidi! Tiel ankaŭ mia koro Vin gloras, mia Patro, ade kiam aperas la aŭrora ruĝo, Vi, mia Kreinto.

(Indiana matenpreĝo)

1. *Mesaĝo de infano.* Ĉiu infano enmondigas kun la mesaĝo, ke Dio ne malesperas pri la homo.

(Rabindranath TAGORE, 1861–1941)

2. *Heredaĵo.* La mondon ne postlasias niaj gepatroj, sed ĝin pruntedonis niaj infanoj.

(Afrika proverbo)

3. *Humileco.* La bonon kiun mi faris por aliaj mi severe kaŝos, kaj la bonon kiun aliaj faris por mi, mi ĉie disrakontos.

(Imamo Ali Iben ABOE TALIB, ĉ. 600–661)

4. *Amrikolto.* La tagoj alportas plejmulton al tiuj, kiuj amoplene agas.

(tradicia jainisma proverbo)

5. *Paco.* Kiu pacon ne trovas en si mem, tiu ne peni ĝin serĉante aliloke.

(laŭ F. de la ROCHEFOUCAULD, 1612–1680)

6. *La ĝusta momento.* Ekzistas nur unu momento en la tempo, en kiu ni necese vekigu. Tiu momento estas la nuna.

(BUDAO, ĉ. 563–483 a.K.)

7. *Pilgrimado.* Donu al mi mian jakob-konkon de kvieto, mian fidoskeptron por apogo sur mia vojo, mian skriban ateston de l' ĝojo, nutraĵon senmortan, mian kruĉon de liberigo, mian mantelon de gloro kaj la veran mezuron de l' espero. Tiel mi volas ekpilgrimi.

(Sir Walter RALEIGH, 1552–1618)

8. *La boneco de akvo.* La plej alta bono estas kiel la boneco de akvo. Boneco benon alportanta al dekmiloj da kreitoj, sed nenion postulanta por si mem: plene ĝi kontentas pri la lokoj, kiujn ĉiuj homoj malestimas.

(Lao-ĈU, ĉ. 604–531)

9. *Mistero.* Ni devas vivi en paco kun la fakto, ke ni restas mistero unu por la alia. Reciproke nin komi ne signifas: mi ĉion scias pri ŝi aŭ li, sed ami, fidi kaj kredi unu la alian.

(Albert SCHWEIZER, 1875–1965)

10. *La perfekta akordo.* La diverseco en la familio estu la kaŭzo de amo kaj harmonio kiel ankaŭ en la muziko,

kie multaj malsamaj notoj kunfluas por aŭdigi unu perfektan akordon.

(El la Libro de Baha'í)

11. Kune preĝi. Kuna preĝado en kiu ajn lingvo kaj laŭ kiu ajn ritualo, estas la plej tenera unuiĝo de espero kaj solidareco, kiu ni povas atingi en ĉi tiu vivo.

(Madame de STAËL, 1766–1817)

12. La rado de la potfaristo. Kiel potfaristo kreas vazon el argilo, tiel kreu min vera adepto de via vojo, ho Plejal-tulo. Plenigu min per via graco, ke mi ĉiutage ekzercu mian korpon por servi al aliaj.

(Moderna preĝo de Edward HAYS)

13. La perlo. Perloj ne troviĝas sur la strando; avidante perlon, vi subakviĝu!

(Orienta dirmaniero)

14. Ofero de la animo. La preĝo estu la propra animo sur niaj manoj kiel ofero al Dio.

(Laŭ la Babilona Talmudo, 6a jarcento)

15. La rozario. Mia tasko estas kiel krono de rozoj. Dum la horoj, kiujn bezonas laboro mia, nerimarkite okazos mirakloj en miaj korpo kaj animo. Mia spirito plukreskos. Mia amo al la homoj donos novajn kontaktojn. Mi ĝuos ĉiun sekundon, minuton post minuto, kaj prudente alportos plenĝoje brikon al la templo de mia estado. Mia tasko estas kiel krono de rozoj, kiel rozario.

(Madrida anonimulo)

16. Unu Dio. Kiel la pluvo fluanta el la ĉielo trovas sian vojon al la oceano, tiel la surgenuiĝoj de ĉiuj kredantoj atingas

la ununuran Dion plej altan.

(El Rig Veda ĉ. 1500–1000 a.K.)

17. Estu paco. Ke estu paco en pli altaj sferoj. Estu paco en la firmamentoj kaj sur la tero. Ke la akvoj pace fluu, la plantoj kaj herboj pace kresku. Ĉiuj diaj fortoj alportu pacon. La plej supera Sinjoro estas paco. Ke ni ĉiuj ekkonu pacon, nur pacon. Kaj tiu paco venu en ĉiun el ni. Ŝanti, Ŝanti, Ŝanti.

(Ŝanti = paco superanta ĉiun intelekton.)

(El La Vedoj ĉ. 1500–1000 a.K.)

18. Unika vojo. La vojo al la perfekteco estas sen limoj. Neniu povas fari regulon, kiu diktas ke vi nur laŭ ĉi tiu vojo iru kaj laŭ neniu alia.

(Hazrat Inayat KHAN)

19. Voĉo en silento. Mi kredas ke Dio estas en mi kiel la suno en la koloro kajodoro de floro — la lumo en mia mallumo, la voĉo en silenta kvieto.

(Helen KELLER, 1880–1968)

20. Gvidado. Kio pelas la koron, tio survoĝigas la homon en la plej frua mateno. Kiu havas antaŭ si celon, trovos la rimedojn por ĝin atingi. Kio vivas en la plejprofundo kiel homa konvinko gvidos lin tagon post tago.

(anonima)

21. Lumo. Homoj, kiuj ĉie vidas lastan lumeton, ne tro rapide sidas en mallumo.

(W. den HOLLANDER)

22. Mi estas. Mi estas lampo por vi, kiu min serĉas. / Mi estas spegulo por vi, kiu min vidas. / Mi estas pordo por

vi, kiu frapas sur mi. / Mi estas vojo por vi, kiu vojaĝas al mi.

(Laŭ apokrifaj „Agoj de Johano”)

23. Egaleco. Ĉiam kiam mi renkontas homojn en diversaj partoj de la mondo, ili rememorigas min pri tio, ke ni ĉiuj estas egalaj en la plej profunda senco. Eble ni surhavas aliajn vestaĵojn, eble nia haŭto havas alian koloron, eble ni parolas malsamajn lingvojn. Sed temas ĉi tie pri nur suprajaj diferencoj: esence ni ĉiuj estas la samaj homaj individuoj. Tiu fundamenta egaleco ebligas al ni kompreni unu la alian kaj sperti amikecon kaj proksimecon.

(DALAJ LAMA)

24. Meditado. Kiel homoj ni ĉiuj volas serĉi feliĉon kaj eviti ĉagrenon. Mia limigita sperto instruis al mi ke — por atingi ĉi tion — tre valoras ke ni konstruu kaj konservu pozitivan sintenon de la menso. En la tradicio de budhismo, al kiu mi apartenas, meditado ĉirilate estas unu el la plej efektivaj rimedoj. Meditado kelkfoje signifas, ke ni agu laŭ receptita sinteno kaj silentigu la spiriton, sed ĝi precipe signifas, ke ni senĉese kutimigu nin al pozitivaj pensoj. En ĉiuj religioj la leviĝo de la homaro okupas centran lokon.

(DALAJ LAMA)

25. Instrumento de paco. Sinjoro, igu min instrumento de via paco. Kie regas malamo, igu min semi amon. Kie maljusteco — pardonon, kie dubo — kredon, kie senespero — esperon, kie mallumo — lumon, kie ĉagreno — ĝojon.

(Francisko el Assisi, 1181–1226)

26. Fuĝo. Ĉiu forflugo el la realeco finiĝas kiel urĝa surteriĝo.

(H.M. van der NOORDEN)

27. Dio gardanta. Vivanta Sinjoro, Vi gardis super ni kaj metis vian manon sur nian kapon en la longaj mallumaj horoj de la nokto. Viaj sanktaj anĝeloj gardis nin kontraŭ ĉiuj malbonoj kaj doloroj. Al Vi, Sinjoro, ni dankas tutan nian vivon. Daŭre gardu super ni kaj donu Vian benon ĉiujn horojn de la tago.

(Jacob BOEHME, 1571–1624)

28. Kanto pri l' ĉiela teksilo. Ho nia Patrino Tero, ho nia Patro Ĉielo. Ni estas viaj infanoj, kiuj kun lacaj dorsoj portas al vi la donacojn de nia amo. Teksu por ni klaran vestaĵon; ke la varpo (schering) estu la blanka lumo aŭrora kaj la vefto (inslag) la ruĝa lumo vespera, kaj la franĝoj (franjes) estu la fluanta pluvo, kaj la orlo (zoom) la ĉielarko en la aero. Teksu por ni klaran vestaĵon, por ke ni iru bone vestitaj al lokoj, kie la birdoj kutime kantas kaj kie verdas la herbejoj. Ho nia Patrino Tero, ho nia Patro Ĉielo.

(preĝo de la Teva-indianoj, 19a jc.)

29. Dankemo. Danku pro la matena lumo, kiam vi en frua horo vekiga! Estu dankema pro via vivo kaj forto. Danku pro via nutraĵo! Estu dankema pro la ĝojo de l' vivo! Kaj ne vidante kialon por danki, sciu, ke estas vi, kiu malperfektas...

(Ĉefo TECUMSEH de Shawnee-popolo, mortis 1813)

30. Nova Lumo. Ho Dio, kiu kondukis min el la ripozo de la nokto al la ĝojplena lumo de la tago, bonvolu min konduki el la nova lumo ĉi-taga al la gvida lumo de l' eterno. Ho, el la nova lumo ĉi-taga al la gvida lumo de l' eterno.

(tradicia kelta preĝo)

31. Beleco aminda. Hodiaŭ, kiel en

ĉiu alia tago, ni vekigās malplenaj kaj timemaj. Malfermu la pordon al la instru-ejo sed ne por komenci studon. Enmanigu muzikilon kaj estu la beleco, kiun ni amas, tio kion ni faras. Estas centoj da manieroj por surgenuiĝi kaj kisi la grundon.

(Djelaoeddin ROEMI, 1207–1273)

32. Ĉielaj aŭroroj. Via surtera ĝojo neniam estas perfekta ĝis kiam vi ĉiumatene vekigās en la ĉielo, vidas vin mem en la palacoj de Dio, sentas la firmamenton, la teron kaj la aeron kiel ĉielajn ĝojojn, kun amoplana respekto al la tuta kreitaro, kvazaŭ vi rilatus kun la anĝeloj.

(Thomas TRAHERNE, 1637–1674)

33. Respondeco. En la hodiaŭa mondo, en kiu ĉio altgrade dependas de ĉio, individuoj kaj popoloj ne plu povas solvi multajn el siaj problemoj per si mem. Ni bezonas unu la alian. Tial necesas ke ni disvolvu sentonde universala respondeco. Estas nia komuna kaj persona respondeco protekti kaj flegi la tutmondan familion, subteni ĉiajn pli malfortajn membrojn kaj zorgi pri la medio en kiu ni ĉiuj vivas.

(DALAJ LAMA)

34. Egaleco. Fratoj kreitaj ĉiuj laŭ unu modelo..., fratoj, kiuj havis ĉiuj egalajn kapablojn, egalajn idealojn..., fratoj, kiuj devis helpi unu la alian kaj labori kune por la feliĉo..., — tiuj fratoj fariĝis tute fremdaj unuj al aliaj kaj inter ili komenciĝis eterna malpaco.

(ZAMENHOF)

35. Profetaj vortoj. Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tem-

HIMNO

Kruc' fidela, inter ĉiuj estas nur vi nobla arb': tian frukton arb' neniu donis fronde, flore jam. Dolĉa ligno: dolĉajn najlojn, dolĉan korpon portis ĝi.

Kantu, lango, pri la glora batalvenka laŭro-kron'. Kaj pro ĉi trofeo Kruca sonu nobla triumfkant': kiel la Savint' de l' mondo venkis ĝuste per la mort'.

En kompato pro la kulpo de la prakreita hom', kies manĝo el la pomo estis kaŭzo de la mort', la Kreint' indikis arbon por nulig' de l' arba pek'.

Venantius FORTUNATUS (nask. 535)
el la latina tradukis Gerrit BERVELING

po, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj. Anstataŭ konstante batali inter si, elŝiri la patrujon unuj al la aliaj, perforte altrudi al si reciproke siajn lingvojn kaj morojn, ili vivos inter si pace kaj frate, laborante kune; kaj interkonsente ili celados ĉiuj al unu vero, al unu feliĉo.

(ZAMENHOF)

Kompilis: Jacques TUINDER, 2–4–2003

HA! KIA POTENCA VORTO!

19 majo. Ĉar mi konvinkiĝis, ke nek morto, nek vivo, nek anĝeloj, nek aŭtoritatoj, nek estantaĵoj, nek estontaĵoj, nek potencoj, nek alteco, nek profundeco, nek iu alia kreitaĵo povos apartigi nin de la amo de Dio, kiu estas en Kristo Jesuo, nia Sinjoro. (Romanoj 8:38–39)

Nenio apartigos nin de Lia amo. La malamiko provos konvinki nin pri la malo: ke Dio ne plu amas nin, ĉar ni estas malbonaj, ĉar ni forgesis Lian Vorton, ĉar ni malbone kaj malsaĝe agis, kaj ni ne plu rajtas esti nomataj Filoj de Dio. Sed tio estas nur diabla mensogo! Ja la Vorto de Dio kontraŭe diras! NENIA kreitaĵo povos apartigi nin de la amo de Dio. Tio inkluzivas niajn proprajn mensojn kaj koron, ĉar Li kreis ĉion.

Mankas al ni nur agnoski tiun fakton, kaj reveni en Lian manon; peti al Li, ke Li pardonu nin pro niaj pekoj, kaj Li tuj faros tion, kaj Li redonos al ni la pacon kiu superas ĉian konon.

Tiu ĉi Vorto trafis min en momento kiam mi sentis min apartigita de Lia amo, ĉar mi malbone agis... sed nun, leginte tiun Vorton, mi pentis pro tio kion mi faris, kaj povas interne senti tiun amon... tiun grandan amon, ke nenio povas apartigi nin de ĝi.

Mi esperas, ke ankaŭ aliaj ricevis benon de tiu Vorto.

Dio benu vin ĉiujn!

Elmer

AL KIU VI FIDAS?

„La reĝon ne helpos granda armeo, fortulon ne savos granda forto” (Ps. 33:16)

„Unuj fidas veturilojn, aliaj ĉevalojn; sed ni alvokas la nomon de la Eternulo, nia Dio” (Ps. 20:)

Pro la scio, kompreno, sperto, sukceso, ofico, aŭtoritato, riĉo, renomo, aŭ eĉ ŝanco kiujn ni akiris, ni povas emi fidi ĉi tiujn anstataŭ la Doninton de ili (t.e. Dio). Ili igas nin forgesi Dion, kaj eĉ ribeli kontraŭ Li.

Sanĥerib, reĝo de Asirio havis grandan armeon. Li sukcesis en multaj el siaj militaj ekspedicioj. Li do fidis tiujn kaj blasfemis Dion de Izraelo. Iumatene li ricevis lecionon: li estis venkita kaj tiam li trovis multajn el siaj armeanoj mortintaj (vidu 2 Reĝojn 18–19).

David estis malsama homo. Li jam lernis fidi Dion ekde sia juneco. Kiel junulo, li diris al la giganto Goljat: „Vi iras kontraŭ min kun glavo, lanco, kaj ŝildo; kaj mi iras kontraŭ vin en la nomo de la Eternulo Cebaot...” (1 Sam. 17:45). Eĉ, kiam li fariĝis potenca kun siaj propraj fortaj militistoj, li ankoraŭ fidis la Dion en ĉiuj siaj militaj ekspedicioj. Li ne militis nepetante permeson de Dio (vidu 1 Sam. 23:2,4; 28:6; 30:8; 2 Sam. 5:19,23).

Al kio vi havas fidon? Ĉu al scio, kompreno, sperto, sukceso, ofico, aŭtoritato, riĉo, renomo, aŭ eĉ ŝanco?

„Tiele diras la Eternulo: Ne fieru saĝulo pri sia saĝeco, ne fieru fortulo pri sia forteco, ne fieru riĉulo pri sia riĉeco; sed kiu volas fieri, tiu fieru nur pri tio, ke li komprenas kaj konas Min, ke Mi estas la Eternulo, kiu faras korfavoraĵon, juĝon kaj justaĵon sur la tero; ĉar ĉi tio plaĉas al Mi, diras la Eterluno” (Jer. 9:23–24).

Je la servo de Dio,

pastoro Bayo AFOLARANMI

LA NESCIA FILO

kristana fikcio

Iam olda viro kaj sia filo ekvojaĝis al alia vilaĝo malproksima. Tiam ne estis aŭtomobilo, oni do devis piediri. Ili jam atingis la randon de sia vilaĝo, kiam la viro rimarkis, ke baldaŭ ekpluvos. Nu, estis kun ili nur unu ombrelo. La viro do petis la filon hejmenrapidi por alporti pluv-mantelon, por ke la filo ankaŭ ne malsekiĝu. Tuj forkuregis li.

Li atingis hejmon antaŭ ekpluvis. Li trovis la mantelon kaj ekrapidis revene al la loko, kie li lasis sian patron. Sed antaŭ ol li povis atingi la lokon, jam komencis pluvegi...

Kun kompato la patro ekvidis la knabon alkuri al li. Li ne komprenis, kio okazis. Li jam tre malsekiĝis kaj aspektis malsana. La du manoj estis kvazaŭ ili portis ion, kion li ne povis tuj vidi.

„Ho ve, mia filo, mi bedaŭras forsendi vin en la pluvegon. Ĉu vi ne trovis la mantelon?”

„Mi — mi, mi trovis ĝin”, respondis la filo per lipoj, kiuj tremis pro malvarmumo. „Kie do estas ĝi?” Kviete elportis la sekan mantelon la knabo el sia malseka vesto. Ĝi troviĝis en ujo, en kiu ne povis penetri akvo. La vizaĝimpreso de la patro tuj ŝanĝiĝis el tiu de kompato al tiu de kolerego. Li tuj kaptis ĝin kaj per ĝi batis la knabon.

„Idioto vi estas, mi sendis vin hejme por porti ĝin, por ke vi ne malsekiĝu, jen vi pro malsaĝeco estas malseka ĝis malvarmumo”.

Tiel ĉi kondutas multaj kristanoj, al kiuj Dio donis talentojn. Iuj rifuzas profiti el siaj talentoj eble pro la „justa” kialo

LA VOJO DE LA AGLA KRISTANO

„...sed tiuj, kiuj fidas la Eternulon, ricevas novan forton, ili levas la flugilon kiel agloj, ili kuras kaj ne laciĝas, ili iras kaj ne senfortiĝas” (Jesaja 40:31).

Fidi estas „konfide lasi al iu la decidon pri niaj aferoj, feliĉo, sendanĝereco, ks., aŭ „kredi al la efiko, taŭgo aŭ valoro de io, kiel al garantio kontraŭ danĝero, risiko ks.” La kristano devas tute dependi de, esperi je, kaj fidi al la ETERNULO. Jesuo Kristo diras „...sen Mi vi nenion povas fari” (Johano 15:5), kaj Dio diris al Zerubbabel: „Ne per militistaro kaj ne per forto, sed nur per Mia spirito” (Zeharja 4:6).



de nescio, sed nur al homo estas nescio sincere akceptata kiel bona kialo. Kiam oni esperas aŭdi voĉon el la ĉielo rilate kiel uzi sian talenton, oni eble restos malprofitema al la Dia Regno. Dio mem lamentis: *Mia parolo pereos pro tio, ke ĝi ne havas scion* (Hoŝea 4:6). Ĉar Dio ne akceptos nescion kiel pretekston, kiam temas pri Diaj aferoj, la Biblio jam ordonas: *La komenco de saĝo estas: akiru saĝon: kaj por via tuta havo akiru prudenton* (Sentenco 4:7). Oni DEVAS akiri Dian prudenton. Dio kreis homon laŭ Sia bildo (Gen. 1:26) por ebligi akiron de saĝo. Ĉiu havas kapablon serĉi kaj akiri saĝon. Se do iu spertas perdon ĉu portempan ĉu eternan pro manko de ĝi, tiu ne estas senkulpa.

Dio diras: *Mia filo! Atentu mian saĝon* (Sentenco 5:1).

Olúwábùnmi Gabriel Òshó-Davies

La „flugilo” ĉi tie ne estas tiu de ordinarnaj birdoj, sed tiuj de aglo. Estas nature por agloj flugi alten, pli ol aliaj birdoj. Figure, agla kristano kiu fidas al Dio kaj daŭre renovigas sian Dio-donatan forton flugas alten super aliaj en ĉiuj siaj klopodoj. Ĉi tiu estis la origina celo de Dio por homaro je la komenco antaŭ ol peko rampis en la mondon (Genezo 1:28). Li ankoraŭ celas ĉi tion por tiuj kiuj „... obeos [Liajn] ordonojn... por observi kaj plenumi” (Readmono 28:13).

Kuri estas „iri per movoj pli rapidaj ol en marŝo, dum kiuj ambaŭ piedoj periode troviĝas samtempe en la aero”. Multfoje en la Sankta Biblio, kristana vivo estas portretita kiel kurado (vidu 1 Korintanoj 9:24-27; Galatoj 5:7; 2 Timoteo 2:5; 4:7; Hebreoj 12:1-2).

Esti laca estas „sentanta sin malvigla kaj bezonanta ripozon pro eluzo de siaj fortoj per troa penado”. Estas nature esti lacigita post aŭ dum kurado. Tamen, agla kristano kiu fidas al Dio kaj renovigas sian forton NE estos lacigita dum kaj post sia kristana kurado. Efektive, li/ŝi havas pluan forton kuri.

Iri estas „moviĝi per la tiucelaj... piedoj direkte al iu au io”. Spirite, iri estas ekzisti aŭ vivi. Tial, kiam la Sankta Biblio diras, ke oni iris kun Dio, tio signifas, ke tiu homo ekzistis aŭ vivis kun Dio. Ĉi tio ankaŭ estas aplikebla, kiam ni estas admonataj iri kun Dio.

La vojo de la agla kristano estas fidi kaj kredi al Dio; renovigi sian forton; „flugi alten” super aliaj; kuri per pacienco; kaj iri en la lumo, amo, kaj vero sen laciĝo. Ĉu vi estas en tia vojo?

pastoro Bayo AFOLARANMI

PS. Ĉi tiu estas mallongigita teksto de klarigita studo de Jesaja 40:31. Mi sendus

ĈU DIO FORGESAS MIN?

Ĉu ĉi tiu Dio plu estas adorinda? Ĉu mi povas fidi al Li? Ĉu Li eĉ aŭdas miajn preĝojn? Ĉu Li ne malrapidas pri sia promeso al mi, ke kiam ajn mi vokas al Li, Li respondas min? Ĉu Li jam forlasis min? Ĉu mi ne plu estas Lia infano? Ĉu Li eĉ forgesas min?

Ĉi tiuj estas la demandoj, kiuj ĉiam venas al la menso de iu ajn kiu petadas ion de Dio kaj ne akiras la respondon laŭ sia espero. La demandoj eble estas faritaj de iu kiu travivis malbonaĵon kiel suferon, morton de amatoj, malbonŝancon, ktp. Multaj eĉ troiras ĝis malkonfeso de la ekzisto de Dio pro ilia sperto.

Ĉu Dio efektive forgesas tiajn homojn? NE. La Biblio diras:

„Ĉu povas virino forgesi sian infaneton kaj ne kompati la idon de sia ventro? Eĉ se ili forgesos, Mi [Dio] vin ne forgesos” (Jesaja 49:15).

Ankaŭ: „...ĉar Li mem diris: Mi ne foriros de vi kaj ne forlados vin” (Heb. 13:5).

Dio vin ne forgesas. Vin Li ne forlasis. Li ankaŭ meritas viajn laŭdojn. Li estas inda de via adoro. Li ankoraŭ regas ĉion ajn kio okazas. Nur fidu al Li. Preĝoj viaj estos responditaj. Iliajn manifestaĵojn vidos vi plej baldaŭ. Ĉesu fari al vi mem zorgon. Estos bone baldaŭ.

En la servo de Dio,

pastoro Bayo AFOLARANMI

la plenan studon en la angla je via peto. Dankon. (Difinoj el Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto kun Suplemento).

LA KAPTILO DE LA DIABLO

Jen preĝo por vi: Vi ne estu kaptita per la kaptilo de la diablo. Amen.

Ĉu vi konstatas ke homoj multe da tempo ne evitas la kaptilon de la diablo kaj estas kaptitaj per ĝi?

Estas evidente ke peko estas la kaptilo de la diablo. Kelkaj homoj ĝuas pekon pli ol Dion. Ili vadas en peko ĉiutage kvazaŭ ĝi ne havus postefikon. Ili trompas sin dum ili pensas ke ili trompas Dion. Ĉu eĉ Dion ni trompas? Kion ni faras pri tiuj malgrandaj ŝakaloj kiuj detruas niajn vinberĝardenojn? (Vidu Altan Kanton 2:15). Tiuj malgrandaj pekoj en niaj vivoj, ĉu ni nin gardas ĉesigi ilin? La problememo estas ke ili baldaŭ grandiĝos. Ili ne restas malgrandaj. „Ĉu vi ne scias, ke *malmulto da fermentaĵo fermentigas la tutan mason?*” (1 Kor. 5:6, vidu ankaŭ Gal. 5:9). Ni ludas kun la juĝo de Dio! ATENTU pri tiuj malgrandaj pekoj — la kaptilo de la diablo.

Denove, vi ne estu kaptita per la kaptilo de la diablo. Diri „Amen” ne estas sufiĉe! Atentu! „*Ĉar vane estas meta-ta reto antaŭ la okuloj de ĉiu birdo*” (La Sent. De Salomono 1:17). Sed ve! Estas bedaŭrinde ke Satano metas sian kaptilon en niajn plene malfermitajn okulojn, kaj homoj estas kaptitaj per la reto! Ĉu vi lasas vin kapti ree?

Je la servo de Kristo,

pastoro Bayo AFOLARANMI

Gazetara komunikado pri la 35a Internacia Infana Kongreseto:

Sonbildoj ĉe sveda lago

La sonoj de naĝado kaj akvoludado ŝvebis ĉiutage super la lago. Poste, krioj

el arbaro: „Mi trovis jam kvin!” Eĥo: „Eĉ unu suĉ-bombonon mi ne trovis... kie... ha jen unu!”

Internacia Futbala Matĉo kun komentario: „Florian plusendas la pilkon al Tomoya, tiu lerte preterpasas du atakantojn, Gretel klopodas haltigi lin, sed ŝoto al golo... Kristine haltigas tion per forta piedbato — tute ĝis la alia golo!”

Jen sonbildo de la 35a Internacia Infana Kongreseto okazinta fine de julio en Lerum, 20 km de Gotenburgo. Ĝi arigis 27 infanojn el ok landoj (Belgio, Francio, Hungario, Japanio, Kubo, Norvegio, Rumanio kaj Svedio), la plimulto knabinoj. Preskaŭ duono venis el E-familioj kun bona lingvoscio; tamen kelkaj havis malpli da kapablo ol la kongreseto bezonas; tiuj ekspediĝis ĉiutage al paroliga kurseto.

Kelkaj gepatroj kaj aliaj familioj kun infanoj aldoniĝis al nia ekskurso al bestoĝardeno en Borås. Alitage, gepatroj, ĵurnalisto kaj interesitoj vizitis la IIK-ejon kaj la infanoj pretigis koncerteton por ili.

Inter la IIK-programeroj estis pentrado, desegnado, kolĉena farado, sportaj olimpikoj kun premioj, apudlaga fajro, du trezor-serĉoj, muzikado, danco, seĝo-ludoj kaj la ĉiunokta endormiga rakonto, per kiu infanoj aŭskultis tutan libron: „Avinjo”.

Vizitu la IIK-hejmpaĝon legi raportojn kiujn la infanoj verkis kaj vidi fotojn. En la hejmpaĝaro de UEA serĉu sub ‘Kongresoj’. Ni kore dankas al Aino, nia surloka gvidanto, kaj al la aliaj gvidantoj kaj helpantoj.

Stefan MACGILL

INDEKSO DE LA JARO 2003

Aktualaĵo

- 839 – p. 36 – *Nia mondo en amplekso draste reduktita.* – TUINDER, Jacques
839 – p. 46 – *Rusa eldono aperis.* –
840 – p. 68-69 – *KELI-prezidanto helpecele vizitis eksajn infansoldatojn en Srilanko.* – TUINDER, Jacques
840 – p. 69-70 – *Kaj Moldavio....* – TUINDER, Jacques
840 – p. 70 – „*Eĉ en la malliberejo ni mezuris okulojn.*” – TUINDER, Jacques
841 – p. 77-79 – *La ne-eldirita parolado de la usona prezidento G.W. Bush post la 11a de septembro 2001.* – BURKHARDT, Adolf
841 – p. 93-94 – *E-Vid-En-E denove vojaĝis al Moldavio!* – TUINDER, Jacques
842 – p. 118 – *Rilatoj inter la kroata ŝtato kaj kristanaj eklezioj.* – BELOSEVIĆ, Marija

Biblio

- 838 – p. 11-12 – *La du instruistoj.* – LAZIAN, Yenovk
838 – p. 9-10 – *La kaŝa vizito (Joh 3:1-12).* – OSO-DAVIES, Oluwabunmi Gabriel
840 – p. 55-56 – *La jaro de la Biblio 2003 – Kion ni havas en Esperanto?.* – BURKHARDT, Adolf
840 – p. 57-63 – *Ĉu la Dekalogo ankoraŭ estas aktuala?.* – HARTIG, Dieter
840 – p. 66-67 – *Kiel ni legas nian Biblion?.* – FARKAS, Éva
841 – p. 81 – *Malbona komenco, pli bona fino.* – AFOLARANMI, Bayo
841 – p. 82 – *Jesuo Kristo, nia amiko.* – AFOLARANMI, Bayo
841 – p. 84 – *Kion vi amas pleje?.* – AFOLARANMI, Bayo

- 842 – p. 109 – *Kiam Dio diras „Ne”.* – AFOLARANMI, Bayo
843 – p. 123 – *Fervoro sen scio.* – AFOLARANMI, Bayo
843 – p. 123 – *El I Ezra....* – BERVELING, Gerrit
843 – p. 124-130 – *Ezra 1 [traduko].* – BERVELING, Gerrit
843 – p. 135 – *Ha! Kia potenca Vorto!* – Elmer
843 – p. 135 – *Al kiu vi fidas?.* – AFOLARANMI, Bayo
843 – p. 136-137 – *La vojo de la agla kristano.* – AFOLARANMI, Bayo
843 – p. 137 – *Ĉu Dio forgesas min?.* – AFOLARANMI, Bayo
843 – p. 138 – *La kaptilo de la diablo.* – AFOLARANMI, Bayo
843 – p. 144 – *Kontenteco: Granda gajnilo.* – AFOLARANMI, Bayo

Diversaĵo

- 838 – p. 16-17 – *La kulpa filo.* – OSO-DAVIES, Oluwabunmi Gabriel
841 – p. 82 – *Nur unu konfeso.* – KÜHNER, Axel; KRÜGER, Siegfried
841 – p. 83-84 – *La edzino malica.* – OSO-DAVIES, Oluwabunmi Gabriel
841 – p. 85-86 – *Epizodo el la vivo de organisto.* – LEUZE, Ernst; BURKHARDT, Adolf
843 – p. 136 – *La nescia filo: kristana fikcio.* – OSO-DAVIES, Oluwabunmi Gabriel

Kongreso

- 841 – p. 91-92 – *Programo de la Ekumena Kongreso.* –
841 – p. 95 – *Tagordo de la jarkunveno de KELI 2003.* – VAN DIJK, Els
842 – p. 100-101 – *[Raporto].* – MATTHIAS, Ulrich

- 842 – p. 101 – *Protokolo de la KELI-kunveno*. – DERCKES, Gerda
 842 – p. 114 – *Ekskurso al Ravenna*. – SOMHEGYI, Zoltán
 842 – p. 99 – *16a Ekumena Esperanto-Kongreso*. – KRÜGER, Siegfried

Kristanismo

- 838 – p. 14-15 – *Liberaj evangeliaj komunumoj*. – PFLÜGER, Reinhardt
 838 – p. 17 – *Maria kaj Marta*. – FARKAS, Éva
 838 – p. 24 – *Apud la tombo de Sankta Apostolo Andreo – unue vokita de Jesuo Kristo*. – DIMITROV, Ĥristo
 838 – p. 3-4 – *Lina Sandell*. – LUNDKVIST, Arne
 838 – p. 4-6 – *Ĉu mi kulpas?* – MANDRAK, Stanisław
 838 – p. 7 – *Kara frato en Kristo*. – DE VOS, Philippe
 838 – p. 8 – *Kiel Dio savis min*. – ŌSHÓ-DAVIES, Olúwábùnmi Gabriel
 839 – p. 39 – *(Saluto de fora Ĉinio)*. – MO Zhi-Xiong
 840 – p. 68 – *Tago memorinda kaj neforgesebla*. – KAIZ, Petro
 841 – p. 79 – *Kruco sur la mapo*. – KUZMENKO, Larisa; KONONOV, Andrej
 841 – p. 80-81 – *Preĝosperto*. – POKORNÝ, Josef
 842 – p. 103 – *Pastoro Paul Schneider „La predikisto de Buchenwald”*. – BURKHARDT, Adolf
 842 – p. 104-107 – *Dietrich Bonhoeffer (1906-1945)*. – KRÜGER, Siegfried
 842 – p. 107 – *Bernhard Lichtenberg (1875-1943)*. – KRÜGER, Siegfried
 842 – p. 108 – *Ankaŭ al mi Dio diris NE*. – BURKHARDT, Adolf
 842 – p. 110-111 – *Ekumena kristanismo kaj paco: Seriozaj pensoj tra duoseriozaj priprenoj*. – ZECCHIN, Armando
 842 – p. 111 – *Ekumenaj Ekleziaj Tagoj en Berlino*. – DERCKES, Gerda

- 842 – p. 115-116 – *Prelego pri la mozaikoj de Ravenna*. – SOMHEGYI, Zoltán

Movado

- 838 – p. 18 – *Al lingva demokratio!* –
 838 – p. 19 – *Interlingvistiko populariĝas*. – KOUTNY, Ilona
 838 – p. 20 – *Gazetara komuniko (Hofheim)*. –
 838 – p. 21-22 – *Novjara mesaĝo de via prezidanto*. – TUINDER, Jacques
 838 – p. 23 – *Nia KELI-prezidanto 70-jara!* – VAN DIJK, Els
 839 – p. 38 – *Infanoj el multaj landoj*. –
 839 – p. 31 – *Karl Buremo 90-jara!* – LUNDKVIST, Arne
 839 – p. 37 – *Agado en la diocezo Speyer*. – EICHKORN, Bernhard
 839 – p. 37-38 – *Seminario en Strasburgo*. – EICHKORN, Bernhard
 839 – p. 39 – *Junaamiko.inf.hu*. – MACGILL, Stefan
 839 – p. 40-42 – *Sekretaria jarraporto pri la jaro 2002*. – VAN DIJK, Els
 839 – p. 43-45 – *Financa raporto de KELI 2002*. – KRÜGER, Siegfried
 839 – p. 46 – *Raporto pri la sveda KELI-sekcio*. – LANDFORS, Mats
 841 – p. 86 – *Fondaĵo edukado – rumana vortaro*. – GBEGLO Koffi
 841 – p. 87 – *Lerno-kompleto de ILEI*. –
 841 – p. 88-89 – *La portugala versio de la libro „Esperanto: la nova latino de la Eklezio” de Ulrich Matthias*. – BURKHARDT, Adolf
 841 – p. 89 – *La revuo de TEJO: Kontakto*. – CORSETTI, Renato
 841 – p. 89-90 – *LIRO-2003*. –
 841 – p. 90 – *Jara raporto KEKO 2002*. – MATONDO, Leonardo
 842 – p. 101-102 – *Raporto de la redaktoro*. – COUSSON, Philippe
 842 – p. 117-118 – *Libera Eŭropa Universitato de AIS Academia Kelemantia en Komarno (SR)*. – POLÁKOVÁ, Eva

- 842 – p. 119 – *Festlibro por Adolf Burkhardt preparata*. –
 842 – p. 120 – *La dua Balta Esperanto-Forumo*. – GORECKA, Halina
 843 – p. 138 – *Sonbildoj ĉe sveda lago: Gazetara komuniko pri la 35a Internacia Infana Kongreseto*. – MACGILL, Stefan

Nekrologo

- 838 – p. 23 – *(T. van der Meulen)*. – VAN DIJK, Els
 839 – p. 47 – *(Stig Kinnander)*. – LUNDKVIST, Arne
 839 – p. 47 – *(Tibor Papp)*. – CSIZÁR, Ada
 841 – p. 94 – *(Ena Shortland „Shorty”)*. – BURKHARDT, Adolf
 842 – p. 130 – *(Hella Lanka)*. – KRÜGER, Siegfried

Poezio

- 838 – p. 18-19 – *Tio dependas de Vi!* – TUINDER, Jacques
 838 – p. 8 – *Himno por ŝtonoj vivantaj*. – ŌSHÓ-DAVIES, Olúwábùnmi Gabriel
 839 – p. 38 – *Memora funebro al David Featherstone*. – HSU Chungmu
 839 – p. 48 – *En unua sunbrilo...* – TOMASZEWSKI, Wiesław
 840 – p. 67 – *Levi l' okulojn*. – ŌSHÓ-DAVIES, Olúwábùnmi Gabriel
 840 – p. 70 – *Mi havis malsaton...* – TUINDER, Jacques
 840 – p. 70 – *Nia tero sufiĉe produktas*. – GANDHI, M.; TUINDER, Jacques
 840 – p. 71 – *Matena preĝo*. –
 840 – p. 71 – *Kio volas resti devas ŝanĝiĝi*. –
 840 – p. 72 – *Preĝo por la paco*. – EDER, Alois; WARE, Robert
 840 – p. 72 – *Ĝis revido!* –
 841 – p. 86 – *Antaŭ viaj okuloj*. – ŌSHÓ-DAVIES, Olúwábùnmi Gabriel
 841 – p. 90 – *Sufiĉe granda*. – HESSELS, Wim; TUINDER, Jacques

- 841 – p. 96 – *Al Ana la floro*. – SCHWITTERS, Kurt; BURKHARDT, Adolf
 842 – p. 118 – *Lumo aŭ mallumo*. – KING, Martin Luther; TUINDER, Jacques
 843 – p. 134 – *Himno*. – FORTUNATUS, Venantius; BERVELING, Gerrit

Teologio

- 838 – p. 12-14 – *Plugu al vi plugotaĵon...* – FARKAS, Éva
 838 – p. 6-7 – *La Reĝo kiu servas*. – VEIT, Jerald
 839 – p. 27-29 – *La tradicioj de homoj: Kiam mortis Jesuo?* – HARLER, Edwin
 839 – p. 29-31 – *Kelkaj pensoj pri Jesuo kiam li estis ironta al la morto*. – DE VOS, Philippe
 839 – p. 32-35 – *Ĉu oni rajtas taksii kristanismon kontraŭekologia?* – ZECCHIN, Armando
 840 – p. 51-53 – *Limoj kaj ebloj*. – SZEMŐK, Balázs
 840 – p. 53-55 – *Mi meditas – vi kunmeditu*. – POKORNÝ, Josef
 840 – p. 64 – *Priprenoj pri la preĝo „Patro nia”*. – DE VOS, Philippe
 840 – p. 64-65 – *Kelkminuta meditado*. – TUINDER, Jacques
 840 – p. 65 – *Preĝo por ĉiu tago...* – KOOPMANS-SCHOTANUS, Jelly
 840 – p. 67 – *kristo@trono.de.graco.ĉielo*. – ŌSHÓ-DAVIES, Olúwábùnmi Gabriel
 841 – p. 75-76 – *Ĉu nia Dio estas ankaŭ Dio de milito?* – ROHLOFF, Wolfram
 842 – p. 112-114 – *Prediko en Prago, 20 julio 2003*. – BERVELING, Gerrit
 843 – p. 131-134 – *Meditigaj pensoj kaj diversadiciaj preĝoj por la dimanĉmatena kunveno*. –

KOTIZOJ DE KELI 2004

Individua membro (kun Dia Regno)	20,00 EUR
Familia membro (sen DR)	2,00 EUR
Subtenanta membro (kun DR)	30,00 EUR

Dumviva membro (20-obla jarkotizo)	400,00 EUR
---------------------------------------	------------

Abono DR (sen membreco) pagante:	
– rekte al KELI	16,00 EUR
– per libroservo	18,00 EUR

KELI-anoj rajtas aboni ›Espero Katolika‹	
– pere de la KELI-kasisto	12,50 EUR

IKUE-anoj rajtas aboni ›Dia Regno‹ pere de	
– C.O. de IKUE	10,00 EUR

Prioritata sendado al	
– ekstereŭropaj landoj	3,00 EUR
– Usono	3,50 USD

Adopta Kaso (por ebligi al finance malfortaj membroj la ricevon de DR; donacoj estas bonvenaj) Donaco

Pagmanieroj:
1. Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu sube).

2. Poŝtĝire al Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, kaj menciu: por KELI-konto kelk-p	
– konto-numero en Belgio: 000-1631831-97	
– Germanio, Köln: 3182 91-509, BLZ 370 100 50	
– Nederlando: 378964	
(el ekster NL aldonu pro bankkostoj 3,50 EUR)	
– Svedio: 74374-0	
– Svislando (Bulle): 12-2310-0	

3. Poŝtĝire al la KELI-konto: 5506132 (INT CHR ESPERANTO BOND – KELI – S KRÜGER HEILBRONN)

– de nederlanda Postbank N.V. (el ekster NL aldonu pro bankkostoj 3,50 EUR)

4. Per via konto ĉe UEA al la KELI-konto: kelk-p

5. Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto:
Siegfried Krüger, Dinkelsbühler Str. 12, DE-74074 Heilbronn, tel./faksilo: +49 (0)7131 162688

6. Per monbiletoj (internacia valuto), senditaj al la KELI-kasisto.

Landaj kotizoj
Belarusio (vidu ĉe Rusio) *)

Britio 15 GBP
Nacia ĝirokonto n-ro 65 274 0006 nome de Fellowship of British Christian Esperantists (FBCE). Kasistino: Diana Richardson, 59 Croft Wynd, Uddington, Glasgow, Skotlando G71 7BJ; tel. 01 698 816 341

Bulgario *)
Peranto: Christo Dimitrov, str. Stracin 16, 7300 Kubrat

Ĉeĥa Respubliko (inkl. Slovaka Respubliko) 250 CZK
Peranto: Pavel Polnický, Lesní 150/VI 29001 Poděbrady, tel. 324 615 651

Estonio *)
Peranto: Endel Ojasild, PK. 24, EE-10502 Tallin

Finnlando 30 EUR
Banka konto Sampo n-ro 800027-4306 454 nome de Suomen Kristallinen Esperantoliitto. Kasistino: Soili Salminen, Kivikatu 8 C 51, 15700 Lahti, tel. 03-781 7637

Francio 25 EUR
CCP n-ro 10456 15 U Paris, nome de Franca Evangelia Esperanto-Ligo (FEEL). Kasisto: Philippe Cousson, 26 Rue de Pré Ventenet, FR-86340 Nouaillé-Maupertuis tel. 05 49 468021

Germanio 24 EUR
Evang. Darlehnsgenossenschaft Kiel n-ro 47 00 40, BLZ 210 602 37; nome de Ökumenische Esperanto-Liga e.V. Kasistino: Astrid Hanke, Am Friedrichshain 37, 25980 Westerland/Sylt, tel. 04651 5510, faksilo: 04651 21963

Hungario *)
Peranto: Irén Bagi, Baross u. 54/B.II.8, 1201 Budapest, tel. 01 283 6566

Japanio 20 EUR
Peranto: Seiziro Kawamura, Kiyomizo-gojo 702, Yamadacho 501, Higashijama-ku-Kyoto 605

Kazaĥstano *)
(vidu ĉe Rusio)

Korea Respubliko 20 EUR
Peranto: D-ro Puramo Chong, Kwangmyong-Shi, Kwangmyong 2 dong 50-5, Kyongki-Do, Sud-Koreio 423-012

Latvio *)
Peranto: Valdis Gulbis, Lielā iela 1 dz. 2, Valdemārpils Talsu raj, LV-3260

Litovio *)

Peranto: Erikas Laiconas, p/k 165, 3000 Kaunas, tel. 370 7 222131

Nederlando 25 EUR
Poŝtbankkonto n-ro 108 75 75 nome de Chr. Esperanto Verg. KUNE; Kasistino: Gerda Dercks, Molenstraat 20, 7607 AL Almelo, tel. kaj faksilo: +31(0)546 819 403

Pollando 30 PLN
Peranto: Kazimierz Leja, poŝtfako 59, 41-250 Czeladź, tel. +48(32) 265 00 38

Rumanio *)
Peranto: Maria László, C.P. 202, 4800 Baia Mare, tel. 062 426182

Rusio *)
(inkl. Belarusio, Kazaĥstano kaj Ukrainio)
Peranto: Larisa Kuzmenko, Kuŝvinskaja 25 A, 622013 N. Tagil, Sverdlovskaja Obl. Rusio

Slovaka Respubliko *)
(vidu ĉe Ĉeĥa Respubliko)

Svedio 220 SEK
Poŝtĝirkonto n-ro 9 14 39-0 nome de Kristliga Esperantoförbundet. Kasisto: Bengt-Olof Åradson, Heimdalsvägen 24, SE-149 32 Nynäshamn, tel. +46 8 - 520 16 816

Svislando 20 EUR
Pagu al la svislanda UEA-konto (vidu supre)

Ukrainio *)
(vidu ĉe Rusio)

Usono 23 USD
Peranto: Jerald T. Veit, 3578 S. Taylor, Milwaukee, WI 53207. Oni sendu ĉekon aŭ poŝtmandaton al la peranto.

*) kotizo laŭ interkonsento kun la peranto.

KONTENTECO: GRANDA GAJNILO

„Sed la pieco kun kontenteco estas granda gajnilo” (1 Tim. 6:6)

Kontentecon difinis iu kiel estante libera de zorgo pro deziro de nenio alia ol tio, kion oni jam havas. Ĝi estas la stato de la animo en kiu, per la graco de Dio, oni estas sendependa de ekstera cirkonstanco (Filipianoj 4:11; 1 Tim. 6:6). Aliaj vortoj kiujn oni povas uzi interŝangeble estas sendependeco, memsufiĉeco, kaj plenumo. Unua Timoteo 6:6 diras jene: „Sed la pieco kun kontenteco estas granda gajnilo”.

Estas malfacile por homoj esti kontentaj. Se oni havas ion, oni aspiras havi plue. Eĉ, dum tio estas sufiĉa, oni vidus alian homon kiu havas ion, kion oni ne havas. Tamen, la Sankta Biblio admonas: „Estu via karaktero sen monamo; estu KONTENTAJ je tio, kion vi havas; ĉar Li [t.e. Dio] mem diris: Mi ne foriros de vi kaj ne forlasos vin. Tial ni kuraĝas diri: La Eternulo estas mia helpanto; kion faros al mi homo?” (Hebr. 13:5-6) La monamo kaj ŝato de aliaj mondaĵoj farigas nin esti ne kontenta je tio, kion ni havas. Ĉi tio jam ruinigis multajn homojn (vidu 1 Tim. 6:7-10).

Pro la fakto ke ni ne alportis ion ajn en la mondon, kaj ni ne portos ion ajn el ĝi, ni devas lerni esti kontentaj je tio, kion ni havas. Ĉio en la mondo estas vantaĵo (Predikanto 1:2). Eĉ homo mem estas kiel spiro (Ps. 39:5-6; 62:9; 144:4). Paŭlo demonstris kontenteco en Filipianoj 4:11-13 kiam li diris: „Tamen mi ne parolas relate bezonon; ĉar mi lernis, en kia ajn stato mi estas, en tio esti kontenta. Mi scias humiliĝi, kaj scias ankaŭ esti en abundeco; ĉie kaj ĉiel mi lernis la se-

kreton pleniĝi kaj malsati, havi abundon kaj havi mankon. Mi ĉion povas fari en tiu, kiu min fortikigas”.

Ĉi tiu lasta deklaro de Paŭlo alkondukos nin al grava faktoro de kontenteco: Graco. Ie, supre, iu difino diris ke kontenteco devenas per graco de Dio. En tiu deklaro de Paŭlo, li diris ke li havis kontentecon en Dio kiu lin fortikigis. Oni povas havi kontentecon nur per la graco de Dio, aparte en ĉi tiu mondo de avareco.

Ĉi tio rilatas al la ĉefa verso: Sed la pieco kun kontenteco estas granda gajnilo. Neniu karna aŭ nespirita homo povas havi kontentecon. Nur tiuj, kiuj permesas al la Sankta Spirito regi ilin povas.

La granda gajnilo en pieco kaj kontenteco estas trovita en la promesoj de Dio. Unu el ili estas Hebr. 13:5-6 jam citita supre. Aliaj estas 2 Kor. 9:8-9; Jesaja 33:6,15; Ps. 33:18-19; 34:10; Luko 12:29-31; 1 Sam. 12:22, ktp. Legu ĉiun de ĉi tiuj versoj mem!

Ekzistas multaj aliaj promesoj de Dio en la Sankta Biblio. Trovu tempon eltrovi ilin. Kontenteco kun pieco estas reale granda gajnilo por iu kiu permesas al Dio regi sian vivon. Ne gravas via kondiĉo: „Pli bona estas la malmulto, kiun havas virtulo, ol la granda havo de multaj malpiuloj” (Ps. 37:6). Vidu ankaŭ Predikanto 4:6. Mi estas kontenta je tio, kion mi havas. Kio pri vi?

Je la servo de Dio,

pastoro Bayo AFOLARANMI

„SOLA GRATIA”

...troviĝas sub la fama pilgrimloko HOSTÝN, de kie estas bone videbla pitoreska moravia urbeto BYSTRICE pod Hostýnem. La tuta ripozejo estas uzebla tutjare por refreŝigaj restadoj, seminarioj kaj kursoj.

La ripozejo konsistas el ĉefa domo „VILA”, konstruita komence de la 20a jarcento, malpli granda domo „CHALOUPKA”, somera domo „LETNÍ PAVILON” kaj preĝejo „KAPLE”.

En „VILA” estas 1- ĝis 4-litaj ĉambroj kun duŝo kaj necesejo. Entute estas 43 litoj kaj la tuta konstruaĵo estas ekipita por uzantoj de rul-seĝoj. En la domo troviĝas manĝejo, bufedo, librejo, saloneto por kaf-trinkado kaj teraso por ripozi.

„CHALOUPKA” ebligas loĝadon de 26 gastoj en 2-4-6 litaj ĉambroj kun propra duŝo kaj necesejo.

„KAPLE” konsistas el preĝejo en la 1a etaĝo kun 80 seĝoj, tre taŭga ankaŭ por koncertoj, kaj teretaĝa salono por 50 personoj, kie povas okazi prelegoj, distraj vesperoj kaj similaj programoj.

Ĉirkaŭe estas vasta (preskaŭ 3 ha) arborparko. Tie Vi povas trankvile promeni kaj ripozi en la ombro de maljunaj arboj. Sport-amantoj povas tie ludi volejbalon kaj tablotenison.

En la proksimeco de BYSTRICE estas multaj interesaj turismaj lokoj (KROMĚŘÍŽ, ROŽNOV p. RADHOŠŤEM, TEPLICE n/BEČVOU).

Ni ŝincere invitas Vin partopreni 54an KRISTANAN KONGRESON de KELI, kiu okazos dum la tagoj 31.07. – 7.08.2004 en „SOLA GRATIA” en la urbeto BYSTRICE pod Hostýnem (Ĉeĥio).

Pliajn informojn donos al Vi kaj aliĝilojn akceptas Pavel Polnický, prezidanto de LKK.

PAVEL ROLNICKÝ
Lesní 150/VI.
290 01 Poděbrady
Tel./fax: 325 615 651
Retpoŝto: cea.polnický@quick.cz

KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA

ALIĜILO

al la 54a KRISTANA KONGRESO de KELI

Bystrice pod Hostýnem, Ĉeĥio

31.07. — 7.08.2004

Familia nomo Persona nomo

Adreso:

Lando: Telefono:

Faksilo: Retpoŝto:

Mi mendas ĉambron: unu-litan du-litan plur-litan

Mi estas vegetarano: JES / NE Mi preferas loĝi kun:

Dato:.....

subskribo

Notoj de LKK:

La aliĝilon sendu al: Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio.

Telefono kun faksilo: 420 325 615 651 – retpoŝto: cea.polnický@quick.cz.

La kristanan kongreson organizas KELI, sed partopreni povas ankaŭ IKUE-anoj kaj ĉiuj aliaj esperantistoj, kiuj volas ĝui kristanan medion.

Organizaj informoj:

Mi estas preta gvidi ĉiutagajn preĝojn – JES / NE

Mi povus prelegi pri:.....

Mi postulas (specialajn dezirojn):

.....

Mi alveturos: trajne / aŭtomobile

kiam (proksimume):

El la provizora programo:

1. Oficiala malfermo de la kongreso
2. Interkona vespero
3. Diservo kun sankta manĝo
4. Prelegoj, kantado, dancado
5. Koncertoj
6. Jarkunveno de KELI
7. Tuttaga ekskurso al la urbo KROMĚŘÍŽ
8. Duontagaj ekskursoj – pieda al la pilgrimloko HOSTÝN
– busaj – al la folkloro muzeo ROŽNOV pod RADHOŠTEM
– al la banejo urbo TEPLICE nad BEČVOU.

BYSTRICE pod HOSTÝNEM estas ĉarma moravia urbeto (20 km de PŘEROV kaj 28 km de VALAŠSKÉ MEZIRŮČÍ). Ĝi estas atingebla trajne, buse kaj aŭtomobile. La kongresejo – SOLA GRATIA estas ripozdomo de Eŭangelia Eklezio de Bohemia Kunfrataro.

Je nia dispono estas preĝejo, vasta parko, sportejoj, parkejo. Preskaŭ ĉiuj ĉambroj estas 1- ĝis 4-litaj kun propra duŝo kaj necesejo. Lifto uzbla. Kelkaj ĉambroj estas ekipitaj por rulseĝuloj.

Sumoj estas en EUROj	La aliĝo validas nur post la pago de garantia sumo			Restadkosto
	ĝis 3 1.1 2. 2003	ĝis 31.03. 2004	post 1.04. 2004	
Kategorio A	10	20	30	90
Kategorio B	30	40	50	200 (250)*

*unulita ĉambro

Kategorio A: Ĉiuj landoj sen B.

Kategorio B: Eŭropa Unio, Skandinavio, Svislando, Norda Ameriko.

- Monsendoj de monbiletoj (EUR) per registrita letero al Pavel Polnický.
- Se eblas, uzu UEA-poŝtĝirkonton aŭ pagu prefere al UEA por konto KELK-P de KELI.